

DUA RENDEVUO DIDAKTIKA

kun Claude kaj Andrée GACOND:

2. Esprimi diversmaniere saman nocion

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 91-002-B-3, 1990.12.20

Cl.- Svisa Radio Internacia invitas vin hodiaŭ al dua rendezuo didaktika kun gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

A.- Ekde la unua leciono de esperanto aŭ okaze de enkonduka prelego vi montras, kiel esperanto memstare formas sian vortaron per kombino de vortelementoj, kaj ke la signifo de tiuj kunmetaĵoj estas tuj komprenebla, sen devi okupiĝi, ĉu tiuj vortoj ekzistas aŭ ne en la aliaj lingvoj. La ĉeestantoj malkovras, ke al vorto de unu lingvo ne necese respondas vorto en alia lingvo. Tiucele vi uzas afiŝojn. La unuan vi jam prezentis al ni la pasintan semajnon. Ĝi analizigas kunmetaĵon de la tipo de **samideano** kaj **samlandano**. Vi raportu pri la didaktika celo de la sekvaj afiŝoj.

Cl.- La dua afiŝo ankaŭ prezentas vort-liston:

A.- Oni legas sur ĝi la vortojn **ĉevalo**, **ĉevala**, **ĉevalino**, **ĉevalido**, **ĉevalisto**, **ĉevalejo** kaj **ĉevalaĉo**.

Cl.- Dum la unua afiŝo komprenigas, ke esperanto vortfarade funkcias kiel izoliva lingvo, do iomete kiel la ĉina, tiu dua reliefigas aliajn vortfaradajn karakterizojn. Unue, ke per ŝanĝo de finaĵo ŝanĝiĝas la gramatika rolo de vorto. De la substantivo **ĉevalo** oni povas ricevi la adjektivon **ĉevala**. Tio estas flekcia trajto, kiu similigas esperanton al la hindeŭropaj lingvoj. En la listo sekvas vortoj formitaj per la aldono de sufikso: **ĉevalino**, **ĉevalido**, **ĉevalisto**, **ĉevalejo**, **ĉevalaĉo**. Jen tipe aglutina trajto, kiu parencigas esperanton al la lingvoj hungara, finna, turka, japana kaj svahila.

A.- Vi elektis do ekzemplojn, kiuj ebligas doni prilingvajn klarigojn.

Cl.- Jes, vi pravus. En enkondukaj prelego kaj lecionoj mi ĉiam provas komprenigi, kie reale situas la internacieco de esperanto. Ke ĝi troviĝas je la nivelo de la vortfarado kaj kvazaŭ sintezas karakterizaĵojn de diversaj lingvo-tipoj. Siajn vortelementojn esperanto ĉerpas el la hindeŭropaj lingvoj latinidaj, ĝermanaj kaj slavaj. Sed tiuj vorteroj restas senŝanĝaj kiel en la izolivaj lingvoj. Afiksaro generas multajn vortojn kiel en la aglutinaj lingvoj. Kaj per flekcioj preciziĝas la gramatika rolo de tiuj vortoj, kiel en la latina lingvo. Se instruanto tion klarigas iom post iom per trafikaj ekzemploj dum la unuaj lecionoj de esperanto-kurso, tiam la kursanoj pli konscie lernas la lingvon. Ili komprenas, ke la internacieco de la vortaro estas submetita al pli grava internacieco, tiu de la vortfarado. Se la lingvistoj André MARTINET kaj Alexandre GODE estus komprenintaj tion, IALA ne estus naskinta la senvivan lingvoprojekton Interlingua en 1951 kaj ne estus abortiginta la esplorojn, kiujn iniciatis Alice MORRIS kaj Pierre BOVET en la unuaj jaroj de la institucio. Blindigis ilin pseŭdosciencaj antaŭjuĝoj kontraŭesperantaj. Ni disvolu didaktikon, kiu faru pli ol nur instrui gramatikaĵojn. Ĝi objekte komprenigu la kialojn de tiuj gramatikaĵoj.

A.- Per viaj vortfaradaj ekzercoj franclingvano studanta esperanton malkovras, ke kontraŭe al esperanto la franca ne havas vortfaradan sistemon. Same certe estas por pluraj aliaj eŭropaj

lingvoj. Tion bone demonstros la traduko de la vortlisto proponita de la dua afiŝo. En la franca ĝi fariĝas: **cheval, chevalin** aŭ **équin** aŭ **de cheval, jument, poulain, palefrenier, écurie** kaj **rosse**.

Cl.- Estas por mi tre grave, ke franclingvano konstati la vortfaradan malkoheron, kiu karakterizas lian lingvon, ĉar nekonsciante pri tio, li tendencos malkoherigi la esperanto-sistemon per kritikoj kaj intervenoj neniel pravigeblaj. Kiom da neologismoj francdevenaj invadis esperanton, nur ĉar iliaj aŭtoroj ne kapablis distanciĝi de la franclingva pensmaniero. Vera dulingvulo profunde inundiĝas de ambaŭ lingvosistemoj. Tiajn dulingvulojn provas naski la didaktiko, kiun mi proponas. Por ke ĉio estu klara, mi tuj avertu, ke ĝi ne venas anstataŭi aliajn instru-metodojn. Ĝi nur kompletigas ilin, aldonante tipon da prilingvaj esploroj, kiujn neglektis ĝis nun la lernolibroj kaj metodoj, kiujn mi havis la okazon analizi. Sed ni revenu al niaj afiŝoj por ekzameni la ekzercojn, kiujn ebligas la tria.

A.- Ĝi listigas kelkajn bestonomojn: **bov, hund, abel, ŝaf, pork, kat** kaj **azen**. Akompanaj bildoj sentraduke tuj komprenigas la signifon de tiuj vortelementoj.

Cl.- Per tiu afiŝo mi proponas aron da ekzercoj vort-kreivaj. Oni povas krei vortlistojn paralelajn al tiu de la **ĉeval**-serio.

A.- **bovo, bova, bovino, bovido, bovisto, bovejo, bovaĉo**, ktp.

Cl.- Tiu paralelismo ebligas al la ĉeestantoj tuj kompreni la signifon de tiuj vortoj. La serĉado de la nacilingvaj ekvivalentoj okazigas ofte grandajn diskutojn kaj leksikajn esplorojn, kiuj ne estas sen utilo. Ili favoras la asimiladon de la pridiskutataj vortoj kaj naskas simpatian al esperanto kaj psikologian pretiĝon akcepti, ke esperanto indas je respekto samnivela al tiu, kiun oni havas por la propra lingvo.

A.- Kiun alian ekzercon vi proponas?

Cl.- Alia ekzerco povas esti sistema esploro pri la sufiksoj mem tra la proponita bestaro. Ekzemple por la id-vortoj, laŭ la modelo **ĉevalo - ĉevalido**.

A.- **bovo - bovido, hundo - hundido, abelo - abelido, ŝafo - ŝafido, porko - porkido, kato - katido, azeno - azenido**.

Cl.- Almenaŭ por franclingvanoj la serĉado de la nacilingvaj ekvivalentoj estas ekzerco kelkfoje laboriga.

A.- **cheval - poulain, boeuf aŭ bovin - veau, chien - chiot, abeille - larve, mouton - agneau, porc - porcelet, chat - chaton, âne - ânon**.

Cl.- La kvara afiŝo estas tre grava. Ĝi komprenigas alian aspekton de la internacieco de esperanto.

A.- Ĝi havas bildon de kapo de ĉevalo. Super ĝi troviĝas la vorto **jen** kaj sub ĝi oni legas:

kapo de ĉevalo
kapo ĉevala
ĉevala kapo

ĉevalokapo

ĉevalkapo

Sekvas bildoj de la kapoj de la bestoj de la tria aŭŝo.

Cl.- Tiu kvara aŭŝo kondukas al strukturŝanĝa ekzerco kompreniganta, ke esperanto esprimas diversmaniere saman nocion. Bildo estas kvazaŭ reprezentado de baza lingva nocio, kiu respeguliĝas diversmaniere. Dum la etnaj lingvoj privilegias nur unu aŭ kelkajn el la surfacaj respeguliĝoj, esperanto provas inventarii ilin. Pro sia internacieco ĝi proponas al la praktikantoj aron da respegulaĵoj. Franclingvano tuj rekonos sian **tête de cheval** kaj germano sian **Pferdkopf**.

A.- Per esperanto oni malkovras alilingvajn manierojn pensi la saman bazan nocion.

Cl.- Pro tio esperanto helpas al la instruado de aliaj lingvoj.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Se la koncerna rendezuo didaktika kun Claude kaj Andrée GACOND vin interesis, vi povas skribi, por peti fotokopion de tiu disaŭdigo. Ni rememorigas ia adreson: Svisa Radio Internacia, CH-3000 BERN 15, Svislando. Ĝis reaŭdo!

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), novembro 2012